

# Esperiga komuniko (EKO) de UEA kaj ILEI

EKO 2020-06 sendita el Whangarei, Noz-Zelando la 12an de februaro.

## Turkio allogas por la 13a Mezorianta Kunveno

Tiu kunveno okazos en Cesme, apudmara urbeto 85 km for de Izmir inter la 27a kaj 31a de marto. La akceptejo funkcios en la vendredo ekde la tagmezo, kun la unua programero je 16.00h. Por pliaj informoj vizitu: [https://uea.org/vikio/Programo\\_en\\_%C3%87e%C5%9Fme](https://uea.org/vikio/Programo_en_%C3%87e%C5%9Fme)

Navigu de tie al aliaj paĝoj en la vikio. Aliĝis jam personoj el Alĝerio, Belgio, Francio, Germanio, Hungario, Irano, Kuvajto, Maroko kaj Turkio. Internacia etoso kaj bunta programo atendas vin.

Ene de la MK okazos la 63a seminario de Aktivula Maturigo (AMO), kun temo 'Trejnado de agantoj en la Mezoriento'. Inter la gvidantoj estos Keyhan Saradpour, infan-kardiologo el Teherano, Murat Ozdizdar, instruisto el Istanbul kaj Stefan MacGill, kunordiganto el Hungario. Ene de la seminario la partoprenantoj plenumos FLAM-analizon, kiu gvidos al serio da rekomendoj por agado kaj trejnado en la regiono. Vidu <https://eo.wikipedia.org/wiki/FLAM-analizo>



La MK finiĝos matene de la 31a de marto. Sekvos por dezirantoj dutaga kaj dunokta ekskurso al la renova urbeto Sirince, sur montoflanko 155 km de Cesme kaj 63 km de Izmir.

Abundas flugoj al Izmir, la tria plej granda urbo de Turkio. Facile tiu urbo estas atingebla el Istanbuloj trajne au buse. La flughaveno de Izmir, 18km de la urbocentro, havas fervojan stacion kun 14 trajnoj tage al la urbocentro.




Fotoj supre: vidoj de Cesme. Sube: vidoj de Sirince.



Sube kaj sekvapaĝe: fotoj de Izmir, la enirejo al Cesme kaj Sinince.





## UMEA strebas al honorigo de lingve kapablaj hospitaloj

La faka asocio pri medicino, UMEA, decidis aljuĝi formalan diplomon al ĉiu malsanulejo, kiu pruvas la fakton, ke ĝi ofertas senpagajn kaj daŭre disponeblajn tradukservojn en almenaŭ dek diversaj lingvoj inkluzive de *Esperanto* por helpi fremdajn gemalsanulojn, kiuj bezonas helpon en la institucio. Por peti agnoskon kaj diplomon, ni petas ilin skribi al ni kaj aldoni taŭgajn dokumentojn kiel atesto de la servo: <http://umea.fontoj.net/projektoj>. Eble vi ŝatus informi viajn naciajn asociojn pri tiu ebleco.

Christoph Klawe, prezidanto de UMEA.

## Film-konkurso en Svislando – ekagu rapide!

Svisa Esperanto-Etfilmkonkurso 2020 „**Unueco en diverseco**“ sub la aŭspicio de Svisa Esperanto-Societo. Aliĝu nun kaj submetu vian filmon: <http://esperanto.ch/etfilmkonkurso>

Por germanlingvanoj: Schweizer [Esperanto-Kurzfilmwettbewerb](http://esperanto.ch/kurzfilmwettbewerb) 2020 „Einheit in Vielfalt“ unter der Schirmherrschaft der Schweizer Esperanto-Gesellschaft. Melde dich jetzt an und reiche deinen Film ein: <http://esperanto.ch/kurzfilmwettbewerb>

Por anglalingvanoj: The Swiss Esperanto Short Film Contest 2020 “Unity in Diversity” is organized under the auspices of the Swiss Esperanto Society. Participate and submit your film to: <http://esperanto.ch/kurzfilmwettbewerb>. Films must be spoken in Esperanto or have subtitles in Esperanto.

Por franclingvanoj: Le concours suisse “Espéranto” de courts films (3-5 minutes) “Unité dans la diversité” est organisé par la Société Suisse d’Espéranto. Participez et envoyez votre film à <http://esperanto.ch/kurzfilmwettbewerb>. Les courts-métrages doivent être en espéranto ou bien présenter des sous-titres en espéranto.

**En la konkurso rajtas partopreni filmistoj el la tuta mondo. La filmoj devas esti parolataj en Esperanto aŭ havi subtitolojn en Esperanto.**

Disvastigu tiun-ĉi informon kaj mem partoprenu, kaj notu la datojn de la Svisaj Esperanto-Tagoj: 30an de aprilo ĝis 3a de majo 2020 en Zuriko!

Samtempe mi alvokas vin kontakti min sub [ses-informas@esperanto.ch](mailto:ses-informas@esperanto.ch), se vi pretas kontribui ion al la programo de la Svisaj Esperanto-Tagoj en Zuriko!

Dietrich M. Weidmann, kunprezidanto de Svisa Esperanto-Societo

PS: SES serĉas homojn, kiuj pretas traduki la tekstojn de la retpaĝo por la etfilmkonkurso al la franca kaj eventuale al la angla. Se vi pretas, anoncu vian al [ses-informas@esperanto.ch](mailto:ses-informas@esperanto.ch)

## Du elstaraj eventoj de ILEI: la 53-a ILEI-Kongreso 2020 en Kebekurbo. La 54-a ILEI-Kongreso 2021 en Edinburgo


La ILEI-Kongreso en Kebekurbo okazos dum la semajno antaŭ UK en Montrealo. La malmultekosta aliĝperiodo daŭras ĝis la 31-a de marto. Ĉion vi povos ekscii en [www.ilei.info](http://www.ilei.info).

## Du elstaraj revuoj de ILEI – IPR kaj *Juna Amiko*

La oficiala organo de nia instruista Ligo ILEI estas *Internacia Pedagogia Revuo* (IPR). La redaktoro, Jozefo Nemeth, anoncas la aperigon de la unua numero por 2020. IPR estas argumenteble la plej altkvalita faka revuo en nia movado. Tiun altan nivelon prizorgas la redakcio jam tra 25 jaroj. Reto de provlegantoj zorgas pri alta lingva nivelo.

Pri la enhavo de IPR 2020/1

- Enkonduko (Mireille GROSJEAN) p.3.
- Germain PIRLOT: Kunlaboro kun AEDE (EAI) p.4
- Javier ALCALDE: Esperanto kaj sociaj sciencoj p.7
- Programo „Unu leciono pri Esperanto por ĉiu lernejo en la tuta mondo” p.10
- Kvartaga kurso Instruista Trejnado (EIT) en Bujumbura p.15
- Mireille GROSJEAN: Piaget ne atingis Afrikon p.16
- Raporto de ILEI-delegitoj pri la Ĝenerala Konf. UNESKO 2019 (M. ARNAUD) p.18
- Ĉefaj decidoj de la 40a Ĝen. Konf. / Monda Raporto pri Edukado (R. TRIOLLE) p.22



- Gravaj kaj ne gravaj punktoj por la Ligo (Mireille GROSJEAN) p.24
- La 60-a Internacia Esperanto-Sumoo (HORI Jasuo) p.22
- Festa ludvespero okaze de la 70-jariĝo de ILEI – parto III. (M. GROSJEAN) p.25
- El la landoj kaj sekcioj (DE, CD, HR, NL) p.27
- Jean-Claude ROY: Mia deziro por 2020 kaj por la 20-aj jaroj p.33
- La 53-a ILEI-Kongreso en Kanado – pliaj informoj p.34
- Informoj pri ILEI, redakciaj informoj, adresaroj de funkciuloj p.38

Iru al [www.ilei.info](http://www.ilei.info) por pliaj informoj pri IPR kaj ILEI kaj por trovi la mendilon por ekesti membro de la Ligo kaj per tio ricevi la revuon, en reta aŭ presita formo.



Ekkonu la kvaliton de la revuo *Juna Amiko* – revuo kun preskaŭ 50-jara tradicio. Tra la jardekoj la revuo proponis relative simplajn, mallongajn tekstojn konvenaj por lernantoj de la lingvo.

# Juna amiko

La supre menciita retejo de ILEI donas pliajn informojn pri la revuo. Eblas peti specimenan ekzempleron.

La revuo estas bela kaj kolore ilustrita kaj havas simile rigoran lingvan kontrolon.

vortoj: 830

Por aldoni au subtrahi vin, legu la tekstojn fine de la komunikoj el 2019.